

Bilda Memor-Libro



Jen la reprodukto de la titolo de la unua “Impulso”, 1967. En ĝi oni povis legi pri la Deklaro de Santos Dumont, la fondiĝo kaj agado fare de junuloj, raporto pri la dua internacia festivalo de populara muziko, pri fus-licencoj uzata en E-a poemaro i.a.

“Miss” BEJO 1977,
elektita en Santos, SP.

Lokoj:

1-a: (centro)
Heliana Correa (SP)

2-a: (maldekstre)
Estela (GO)

3-a: (sub rigardo de Z)
Denise Deslandes (RJ)



De maldekstre staras:

Eliana (RN), André Luiz Fausto (forpasinta, RJ), Luiz Alberto Coelho (RJ), grava nekonatulo, Heliana Barrocas (SP), Rosana Caraméz (RJ), Denise Deslandes (RJ) kaj du pliaj nekonatuloj; sidas:

Ciro Gomes de Freitas (MT), Néia Lúcia de Souza (DF), kaj du movadaj nekonatuloj.

Interjuoj

Mia nomo estas **Néia Lúcia Souza** kaj mi estas 41-jaraĝa.

Esperanton mi konis de la infanaĝo sed mi nur sukcesis fari la kompletan bazan kurson en 1973, en Goiânia-GO. Tiam BEJO estis neaktiva kaj ĝia dokumentaro estis trovita en 1974-1975, kiam alia goianano translokiĝis al Rio de Janeiro kaj ĉeestis esperantan kurson en Kultura Kooperativo de Esperantistoj -KKE.

La kunveno por pridiskuti eblecojn restarigi BEJOn okazis dum la Brazila Seminario de Esperanto, evento organizita de KKE, en Valença - RJ, 1975. Ĉeestis la kunvenon ĉirkaŭ 50 gejunuloj el diversaj urboj el Brazilo. La gejunuloj komencis engaĝigi kaj al-

iflanke la plenkreska movado komencis reagi ĝenite.

Ni multe demandis, serĉis, kritikis...

Mi ne esperantigis pro la junulara movado sed mi esperantistis pro ĝi.

Bejo favorigis mian restadon en la esperanta medio pro ĝia plej alta kvalito: esti memstara organizaĵo kie la gejunuloj havas kondiĉojn praktiki, lerni, provi novajn vojojn.

Ĝi havas la esencon de libera forumo kie la gejunuloj povas demandi, plendi, kontraŭstari la stagnecon aŭ hipokritecon kaj kromajn misfunkciojn de la cetera movado.

Al BEJO mi suldas mian tutan movadan vivon kaj mi estas ege danka al ĝi.

Biografieto de **Hilarina Aires**

Mi estas 31-jaraĝa (naskiĝdato 10.09.65). Mi ekkonis E-on en 1979, pere de Ramatis Pessoa de Luna, entuziasma E-disvastiganto. Tiam mi opiniis E-on simpla kuriozaĵo kaj tuj forgesis ĝin. Kiel mi ĉiam satis fremdajn lingvojn, mi decidis, en 1986, partopreni kurson de P-ro José Elias Barbosa Borges, ĉe Federacia Universitato de Paraíba; krome mi opiniis E-on malpli malfacila lingvo. Bedaŭrinde tiu kurso mallonge daŭris, kaj mi devis do plu lerni ĝin sole. En tiu dua fazo, mi vere eksatis tiun lingvon kaj komencis kredi je ĝia inklino esti internacia kaj neŭtrala lingvo. Pro tio mi ne plu ĉesis lerni ĝin kaj komencis ja praktiki ĝin per korespondado, abonado de periodaĵoj kaj aĉetado de facilaj verkoj. Mi ja ekpraktikis ĝian paroladon en la unua nacia kongreso de Esperanto, kiun mi partoprenis, en Campo Grande-MS (1989).

Malgraŭ ke mi esperantistiĝis iom

frue, mi kontaktiĝadis precipe kun plenkreskuloj kaj tre malofte turnis min al la junulaj institucioj kaj same malofte partoprenis porjunulajn aranĝojn. Fakte mia partopreno limiĝis nur al regula remembrigo al TEJO. Nur post la 14-a BEJK, en Barra do Garças-MS (1992), mi regule aniĝis al BEJO ĝis mia "adoltiĝo". Pri tio, kaŭze de mia "adolta" sinteno, komence de la 90-aj jaroj mi partoprenis komunan aktivadon kadre de E-asocioj de brazila nordoriento. Tiam, dum ĉirkaŭ du jaroj mi redaktis la nurajn ses numerojn de *Nordorienta Informilo* (mi estas ĵurnalisto) kaj helpis organizi eventojn, nome laborkunsidojn, prelegojn kaj E-kursojn en mia urbo kaj la nacian kongreson en Natal (1994).

Kiel juna aktivulino, mi fariĝis reprezentantino de BEJO por Nordoriento en la periodo 1992/94, post partopreni la 14-an BEJK. Mi ankaŭ fariĝis korespondantino de TEJO-Tutmonde

pri Sudameriko de 1993 ĝis 1994.

En mia persona historio ĉe junulara E-movado, mi elstarigas mian partoprenon en la 15-a BEJK, en Natal (1994), kiam mi, kune kun Néia Lúcia Souza, Fabrício Valle kaj Ilmar Ferreira, gvidis fulman kampanjon por membriĝo al BEJO, kiu travivis seriozan krizon minacantan ĝian supervivon kiel organizo. De la 37 junaj kongresanoj, nur 15 estis kvitancitaj por tiu jaro; krome BEJO estis tiam tute “senkapa”. La ĉeestantoj elektis la tutan estraron, kies prezidanto fariĝis Ilmar Gomes Ferreira.

Mia baza vidpunkto pri E-o ne sangis. Kompreneble estante pli juna, mia idealisma sinteno estis pli signifa ol la mia nuntempa. Vere juneco estas ĉiam idealisma, kaj tiu aspekto – mi agnoskas – donas al tiu homa vivofazo tiom da beleco kaj romantismo. Sed kiu estas mia

baza vidpunkto pri E-o? Nu, mi opinias ke E-o estas unue kaj precipe lingvo. Ĝi estas kreita por fariĝi “komuna lingvo de la homaro”. Malgraŭ tiu, mi kredas ke tia “komune-co” ne devas enhavi tiom emfazan signifon de “fina homa interkompreniĝo” ĉar neniuj lingvoj, ĉu ‘artefarita’ ĉu ‘natura’, sukcesos tion pro la nehaltigebla homara emo ne komplete interkompreniĝi per frata interkonsento.

Mi ankaŭ kredas al la ebleco E-o esti adoptita kiel la dua lingvo de tiu parto de la homaro, kiu bezonas uzi komunan lingvon en internaciaj rilatoj. Kaj miaopinie, adopti E-on kiel solvo al lingva problemo estas racia sinteno samkiel akcepti la postulojn de homaj rajtoj, naturprotektado, demokratio, ktp, cele al la konservado de pozitivaj aspektoj de nia mondo kaj al la konstruado de pli evoluita homaro.

“E.T. Phoned Home”

- Ĉu tiu lingvo, kiun vi parolas kaj disvastigas, vere funkcias internacie?

- Ŝajne jes, sed tio malmulte gravas al la brazilaj esperantistoj ĉar, pro tio ke ili malsatas eŭropanojn kaj nordamerikanojn, loĝas tro malproksime de Azio kaj Oceanio tre kontentas pri si, ili preferas paroli Esperanton nur inter si mem kaj eĉ dediĉas pli da energio al la eldonado de nacia Esperanto-revuo ol al tiu de iu internacia. Ili ne plu konsideras la lingvon kiel rimedon sed kiel celon.

- Ĉu ne ekzistas fremdlingvaj najbarlandoj, kun kiuj brazilanoj povas paroli esperante?

- Jes, sed ili estas hispanlingvanoj kaj la hispana estas tiel simila al la lingvo de brazilanoj, ke ĉi tiuj ne emas paroli Esperante kun ili.

- Kion do brazilaj esperantistoj faras?

- Ili organizas naciajn kongresojn por paroli internacian lingvon...

- Tamen la esperanto-movado kreskas

en Brazilo, ĉu ne?

- Treege! Kiam du brazilaj esperantistoj renkontiĝas, ili starigas Esperanto-asociacion; kiam tria aperas, li fondas apartan organizacion... Krome, ili estas tre entreprenemaj kaj aplikas al la Esperanto-movado la Biblian ordonon: “fruktu kaj multigi”. Pro tio ili volis organizi apartan Pasportan Servon, planas la fondadon de plia esperantista komunumo kaj eble estonte eĉ entreprenos la kreadon de nova internacia lingvo. (...)

- Nu, kiel brazilaj esperantistoj laboras por disvastigi Esperanton?

- Ili semas kaj semas konstante.

- Ĉu ili plugas?

- Ne! Ili semas kaj semas konstante.

- Certe ili sterkas, ĉu ne?

- Ne! Ili semas kaj semas konstante.

- Ili almenaŭ akvumas, mi supozas.

- Ne! Ili semas kaj semas kaj semas kaj semas kaj semas kaj...

El Impulso, n-ro 1 / 1984

José Mário Marques, advokato, Natal
Mi nun estas 51-jara. Plurfoje mi provis lerni la lingvon pere de esperanta broŝureto, ricevita donace de mia plejaga frato kiam li studis en katolika seminario.

Kolegino mia, informita de mia intereso pri Esperanto, min sciigis, ke sia frato estis antaŭ pli ol 20 jaroj eklerninta tiun lingvon kaj li proponis pruntepreni mianome gramatikon. Per tiu libro mi memlernis Esperanton en unua duono de 1961 kaj post trimonata studado mi finis ĝin, kaj - mirige! - sukcesis legi la libron "Veterano".

En la tempo de mia esperantistigo ne estis junulara movado en Brazilo. En la komencaj monatoj de 1964 mi translokiĝis al Natal, por daŭrigo de miaj studoj, kaj tie mi persone kontaktis la tri solajn esperantistojn, kiuj multajn jarojn antaŭe aktivis por la lingvo. En la fino de 1966, mi jam estis renkontinta 2 junulojn (José Raposo da Silva kaj Ereni Pereira), krom mi, interesatajn pri lernado de la lingvo. En kolektiva vizito al S-ron Arlindo Castor de Lima, ni estis informitaj pri la ekzisto de Guanabara Esperanto-Junularo kaj pri ties deziro kontakti junajn esperantistojn el la tuta lando cele al fondo de aliaj Esperanto-Junularoj tra Brazilo. Ni tiam decidis organizi kurson, kies malfermo okazis en aprilo/1967. En la monato septembro ni estis informitaj pri la Manifesto de Santos Dumont, prenita de Guanabara Esperanto-Junularo, Ceara Esperanto-Junularo kaj Ribeirão Preto Esperanto-Junularo (?), laŭ kiu fondiĝis BEJO, ricevante samtempe ekzempleron de la revuo Impulso kaj de la informbulteno BEBO, kun insigo de aktivado de ĉiuj junuloj kaj fondo de

“...kaj post trimonata studado (...) - mirige! - mi sukcesis legi la libron ‘Veterano’.”

lokaj junularoj. En aprilo 1968, mi komencis kurson. Ĉirkaŭ 18 novaj lernantoj eklernis efektive la kurson. Estas aparta kuriozaĵo pri ĝi. Komencinta en Spiritista institucio, la plejmulto el la lernantoj elektis poste translokiĝi al alia loko, pli proksima por la plejmulto: protestanta lernejon. En la sekvanta

jaro, tiu grupo partoprenis sub mia gvido kompletigan kurson en apudĉambro de katolika preĝejo! Vere ekukena kurso.

Mi estis elektita Sekretario de BEJO en 1969 kaj Prezidanto de BEJO en 1970. Tiam, ŝajne pro la degeneriĝo de la politika situacio de la lando kaj manko (BEL) aŭ fino de la financa apogo (KKE) al la nova organizo, Guanabara E-Junularo, en Rio (ĉefa motoro de BEJO, kune kun CEJ, en Fortaleza) ekmalviglis, unue per la perdo de Wechsler, kaj poste per la perdo de Gustavo kaj fine de Paulo Viana kiu rezignis pri la sekretariecon de la nova nacia junula organizo. Kaj en julio 1970 la ĉeestantaj junuloj en la Brazila Seminario en Belo Horizonte decidis transdoni la gvidon de BEJO al la nordorienta regiono, pro tio ke nur en tiu regiono ankoraŭ la junulara movado vere estis ankoraŭ aktivanta. Sen antaŭa sciigo aŭ interkonsento, oni decidis (ĝis nun mi pensas ke tiun decidon prenis Sartorato sola! - la sola de la grupo en GEJ kiu restis aktivanta ĉe BEJO) elektis min Prezidanto kaj Carlos Lima Melo, el Fortaleza, Sekretario de BEJO. Estis indikita de mi kiel kasistino mia fianĉino, poste edzino Iraci Nobre Marques.

Tiam vere reliefan laboron realigis Carlos Lima Melo, kiu vojaĝis tra la tuta regiono (Natal, Caruaru, Maceió kaj Rio Largo-AL), gvidanta kursojn laŭ de li adaptita simpligita Cseh-

metodo, fukciigante la tiam nomatan "Instrua Servo de BEJO".

Inter miaj taskoj, krom la kunordigo de la agado naciskala de la estraro kaj regionaj vicprezidantoj, troviĝis ankaŭ la respondeco pri la eksteraj rilatoj kun TEJO, el kio rezultis sistema perletera kontaktado kaj informado pri BEJO-laboroj. El tio rezultis inviton por ke mi respondecu pri la Regiona Agado en Latinameriko, kun provoj kontakti junulojn en la tuta latinamerika kontinento, el kio rezultis en Ĉilio la fondo de la tiea junularo fare de Ivan Mattig Catalan.

En la fino de la jaro 1970 komencis okazi strangaj problemoj en la movado en Natal. Nia Junulara Klubo estis akuzita pri politika subfosa aktivado, kio estis malvera. Poste ni malkovris, ke tri anoj de nia membraro kunvenis aliloke, laŭdire por esperanta laboro, sed fakte por kontraŭregistara aktivado. Pro tio ke mi prenis sintenon rekte kontraŭa al tiu aktivado, ĉar mi kredis ĝin rekte malutila al nia juna movado, tio estis kaŭzo de skismo inter niaj membroj, kun apero de malfido inter parto de la membraro kaj mi, kiu reflektis kaj paralizis la tutan agadon, kaŭzis rompon de la interna kohero de la grupo kaj malvarmigo (nemiaflanka) de la rilatoj inter mi kaj la plejmulto el la restantaj membroj.

En la duono de la jaro 1971 la ĉefa

akuzito pri tiuj problemoj, pro tio ke pamfletis urstrate kontraŭ la vizito de prezidento Medici al Natal, estis arestita kaj torturita. La suspektemoj kiuj falis sur la klubo kaŭzis la forfuĝon

de la plejmulto el la membraro pro timo, eĉ teruro eĉ multaj, inkluzive mia edzino, kiu postulis detruimian kolekton de la Revuo El Popola Ĉinio, por eviti pligravigon de la suspektoj en kazo de polica vizito. Poste tiuj revuoj malaperis el mia domo senspure.

Kiam aperis la suspekto, en la fino de 1970, la plejmulto el la grupo volis transdoni al la loka armea kazerno ĉiujn gazetojn el

la socialismaj landoj (ni havis bonegan kolekton en nia biblioteko: *Nuntempa Bulgario*, *El Popola Ĥinio*, kaj aliaj materialoj el komunistaj landoj, Pollando kaj baltaj respublikoj), sed mi tiam forte kontraŭstaris al tio, inkluzive

ĉar tiel agante, ni povus eĉ plipravigi/pligravigi la suspektojn. En la sekvanta jaro, post la aresto de la preparolita politika aktivulo, kiam mi jam ne partoprenis fakte la kluban agadon, la restantaj membroj, panikis kaj iris grupe/procesie al la loka armea kazerno kaj transdonis tiun "subfosan" materialon.

Samtempe, en niaj kursoj, komencis aperi homoj kies hararoj estis tonditaj laŭ la kazerna sistemo, kiuj en koridoraj kontaktoj kun la lernantoj sufloris al ili ĉesi la studadon de tiu lingvo, "ĉar ĝi

El eksteraj rilatoj kun TEJO, rezultis inviton por ke mi respondecu pri la Regiona Agado en Latinameriko, kun provoj kontakti junulojn en la tuta latinamerika kontinento, el kio rezultis en Ĉilio la fondo de la tiea junularo fare de Ivan Mattig Catalan.

"Nia Junulara Klubo estis akuzita pri politika subfosa aktivado. Poste ni malkovris, ke tri anoj de nia membraro kunvenis aliloke, laŭdire por esperanta laboro, sed fakte por kontraŭregistara aktivado."

estas la lingvo de Kubo". Vi imagas kio okazis al kursoj post tiuj avertoj.

Dum tiu sama jaro, komencis okazi pluraj strangajoj en la komunikado inter la ĉefaj aktivantoj de BEJO: Sartorato, en Rio; Nogueira kaj Carlos Melo en Natal; kaj mi en Natal; korespondajoj prokrastigis, materialoj senditaj de unu al alia, eĉ registritaj ofte perdis senspure ĉe la poŝto. Laŭ miaj registroj, post aŭgusto 1971, la laboro tute paralizigis. Kaj mi, kiel prezidanto ricevis fortajn plendojn ĉefe de Carlos Melo kiu volis respondecigi min, eble prave, pri la stato de la aferoj, laŭ li kaŭzita de mia manko de aktiveco.

En januaro 1972, mi ricevis neatenditan viziton de li kiu postulis intervjuon kun, kiu okazis en la domo de Jose Soares. Tie li kaj laŭ li, ankaŭ Nogueira, konsilis min rezigni la prezidantecon, ĉar laŭ ilia opinio estus plibone, ke la tuta laboro de nun devus koncentriĝi en Fortaleza, kiu havus pli da kondiĉoj ĝin daŭrigi la laboron (li daŭre kiel sekretario, kaj Nogueira kiel Prezidanto). Por lia surprizo, mi tuj akceptis. Lia surprizo, kiel li tiam konfesis, estis kaŭzita ĉar li pensis ke mi rezistus al la ideo,

“Li pensis ke mi rezistus al la ideo (rezigni la prezidantecon), ĉar ili en Fortaleza estis rimarkintaj, ke mia tuta agado ĝistiam celus nur altigi mian personan prestiĝon ene de la movado (!)”

ĉar ili en Fortaleza estis rimarkintaj, ke mia tuta agado ĝistiam celus nur altigi mian personan prestiĝon ene de la movado (!), tio estas mi estis uzanta BEJON por personaj celoj.

Mi tute forlasis BEJON, kaj la laboron por TEJO pri la latinamerika regiono. Tiam kaj tiel melankolie finiĝis tiu unua periodo de BEJO, komence vere tre brila kaj kiu efektive inŝtigitis novan kaj seriozan modelon en la agado por Esperanto en Brazilo. Post BEJO la movado estis alia. BEJO mortis dum pluraj jaroj, tamen pluraj aktivuloj kiuj formis BEJON daŭre restis en la movado kaj eklaboris laŭ tute novaj modeloj, kaj ĉefe kun tute nova entuziasmo.

Deniel ŝanĝigis mia vidpunkto pri esperanto aŭ pri la movado! Mi ĉiam havas la saman fidon kiu min inspiris la artikolo "Essência e Futuro da Língua Internacional", kiun mi unuafoje legis antaŭ 36 jaroj. Mi, dum kelkaj periodoj, seniluziigis pri pluraj movadanoj, sed ne pri la antaŭaj membroj de la estraro de BEJO, kiujn ĉiujn mi daŭre respektas kaj admiras.

Rosana Carames, statoficisto
Rio de Janeiro

Mi estas 40-jaraĝa. En 1974, mi legis libron de Ramatis, kiu rakontas pri la frateco, kiun la ideo de Esperanto entenas. Mi estis tre kortusita de tiu ebleco kaj sinjoro preskaŭ 80-jaraĝa, mia konato, komencis instrui al mi Esperanton per la sama libreto, kiun li uzis por sia memlernado.

Tiam mi lernis la anglan kaj mi paro-

lis pri Esperanto kun miaj kolegoj de kurso. Post kelkaj tagoj, mia koleginino aŭdis la adreson de Kooperativo en radio, kaj ni ambaŭ komencis lerni la bazan, ĉiusabate. Iam aperis en Kooperativo Ciro Gomes de Freitas, el Mato Grosso, kiu komencis paroli pri reaktivigo de la dormanta BEJO. En 1975, dum E-seminario en Valença (RJ), ni tion faris kun kelkaj junuloj tra Brazilo.

Elektigis Ciro kiel prezidanto, mi

kiel vic-prezidantino kaj Néia Lúcia de Souza, el Brasília, kiel sekretariino. Mi tre ĝuis tiun tempon, ĉar dum la seminarioj ni multe laboris: ni varbis membrojn, ni okazigis konkurson por elekti Miss BEJO kaj ni kolektis monon por la jaraj elspezoj. Kompreneble ni ankaŭ amuziĝis, nokte, post la laboroj de la seminario, ni kutime iris al dancejoj, kie ni dancadis ĝis la mateno.

Dum decembro 76, en Bona Espero mi restis kaj instruis la portugalan al la infanoj. Mi tre ŝatis la sperton, neforgeseblan por mi. En februaro 77 ni faris karnavalan grupon en Salvador, kaj partoprenis gejunuloj el SP, RJ, GO, RN kaj eĉ du eksterlandanoj venintaj el Bona Espero, kiuj restis dum karnavalo inter ni.

Ni eldonis la bultenon “BEJO-Infor-

mas”. Mi havis multe da laboro sola, ĉar dum la jaro mi ne havis helpantojn. Mi ricevis korespondaĵojn, kolektis artikolojn kaj liveris la originalojn al Jair Sales, por ke li reviziu la tuton.. Dum la seminario en Santos, 1977, ni elektis alian estraron, kies prezidanto estis Lourenço Sogabe.

Kiel sola filino, mi havis miajn plej bonajn amikojn inter esperantistoj. Pro Esperanto mi multe vojaĝis, kaj sola mi ne konus tiom da lokoj, kiom mi vizitis; do mia sperto pri E-Movado estas la plej bona! La idealo de Zamenhof vivas en la lingvo, kiun mi opinias unu el la plej belaj kaj perfektaj kreaĵoj de la homo. Mi esperas, ke E-o elstarigos por la homaro kiel la plej ebla kaj facila solvo por la lingvaj problemoj kaj baroj en nia mondo.

Aloísio Sartorato, 52-jara,
Rio de Janeiro

Kiel kaj kiam esperantistiuis: mi esperantistiĝis en 63; kolego mia el la laborejo (divenu do: Amarílio Carvalho...) forte influis.

Kiun rolon havis la junulara movado en via esperantistiŭo: en la tempo de mia esperantistiĝo, Amarílio Carvalho gvidis bazan kurson en fora kvartalo de Rio (Campo Grande) kaj tie li stimulis la gelernantojn fondi Esperantistan Junularon. Fakte tio okazis kaj ekestis Esperantista Junularao de Campo Grande, kiu okazigis plurajn junularajn eventojn: festojn, promenadojn ktp. Kvankam ne estante ankoraŭ esperantisto, mi partoprenis en pluraj iliaj aktivecoj kaj tute certe la gaja kaj frateca etoso tie ekzistanta iel influis al mia deziro lerni la lingvon parolatan flue de multaj membroj de tiu junularo.

Periodoj de via estraraneco/juna aktiviŭo:

65-67: kasisto de Guanabara E-Junularo

66-69: kasisto de BEJO

67-68: prezidanto de Guanabara E-Junularo

Viaj spertoj dum tiu periodo: ne nur administraj kaj kasistaj laboroj. Mi respondecis ankaŭ pri preparado de gazetoj: Bebo (informbulteno), Meteoro (organo de Guanabara E-Junularo), Impulso (oficiala organo de BEJO-kulturrevuo internacie laŭdata). Kelkajn mi mem redaktis; aliajn mi pres-arangiis.

Aliaj amuzaĵoj kaj strangaĵoj: tipaj de nia movado, ĉu ne?... Mi sukcesis rememori pri unu detalo: inter la junaj membroj de Guanabara E-Junularo ni “inventis” aliajn vortojn por esprimi la sobrajn “urini” kaj “feki”. Inter ni, ni diradis “maltrinki” kaj “malmangi”. Dek jarojn poste (tio okazis en la 60-aj

jaroj!) mi legis en *Kontakto*, ke la junularo de iu IJK, la TEJO-Kongreso, en la fino de la 70-aj jaroj ankaŭ uzadis tiujn esprimojn. Do saĝnas al mi, ke ni iel estis pioniroj kaj kreivaj, ĉu ne?

Ĝu intertempe ĝianŭiŭis via vidpunkto pri esperanto aŭ pri la movado? Tute ne!

Ĉifoje amis li kvazaŭ ĝi estus lasta foj'
L' edzinon kisis li kvazaŭ ĝi estus lasta foj'
Kaj ĉiun filon kvazaŭ li estus sola fil'
Li iris trans la straton per la propra tima paŝ'

Chico Buarque
trad. L. Knoedt

KONSTRUO

Konstruon grimpis sur kvazaŭ li estus nur masin'
Kaj levis sur plataj' kvar murojn de solida fort'
Per briko apud briko laŭ desegne sorĉa plan'
Vualis la okulojn krom cemento, larmogut'

Li do sidigis sin kvazaŭ jam por sabatotag'
Ĉe fazeol' kun riz' kvazaŭ li estus princa most'
Li trinkis kun singult' kvazaŭ li estus dronadant'
Li dancis kun rideg' kvazaŭ lin ravus muzikist'

Kaj stumblis en ĉiel' kvazaŭ li estus ebruiul'
Kaj ŝvebis en aer' kvazaŭ li estus ia bird'
Surtere kuŝis nun kvazaŭ li estus mola pak'
Kaj agoniis en la mezo de la ĉefa voj'

Li mortis sur misflank' – Malhelpo en la trafikej'

Ĉifoje amis li kvazaŭ ĝi estus lasta foj'
L' edzinon kisis li kvazaŭ ŝi estus sola in'
Kaj ĉiun filon tre kvazaŭ temus pri la erarint'
Li iris trans la straton per la paŝ' de ebruiul'

Konstruon grimpis sur kvazaŭ per tre solida fort'
Kaj levis sur plataj' kvar murojn kun ensorĉa log'
Per briko apud briko laŭ desegne saĝa plan'
Vualis la okulojn la cement kaj trafikej'

Li do sidigis sin kvazaŭ li estus princa most'
Ĉe fazeol' kun riz' kvazaŭ ne estus io plej
Li trinkis kun singult' kvazaŭ li estus nur masin'
Li dancis kun rideg' kvazaŭ li estus tie ĉi

Kaj stumblis en ĉiel' kvazaŭ lin ravus muzikist'
Kaj ŝvebis en aer' kvazaŭ jam por sabatotag'
Surtere kuŝis nun kvazaŭ li estus tima pak'
Kaj agoniis meze de la voj' - dronadant'

Li mortis sur misflank' – Malhelpo en la ĉefa voj'

Ĉifoje amis li kvazaŭ li estus nur masin'
L' edzinon kisis li kvazaŭ laŭ ia saĝa plan'
Li levis sur plataj' kvar murojn kvazaŭ mola pak'
Sidigis poste sin kvazaŭ li estus ia bird'
Kaj ŝvebis en aer' kvazaŭ li estus princa most'
Surtere kuŝas nun simile al ebria pak'

Li mortis sur misflank' - Malhelp' por sabatotag'